

# JEN



—Ĉu vi scias? Post la 12<sup>a</sup> numero, kiam ĝi estos plenuminta sian devon kun la abonintoj, JEN ne aperos plu!  
—Bone mi faris, ne aboninte, kaj petinte nur unu ekzempleron por mia kolekto!  
—Mi konas pli ol 500, kiuj agis, kiel vi!





NE ABONU ANKAŬ

PAPITU'n

Kataluna satira karikaturo gazeto.  
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jarkvarono. . . . . 2 Ptoj.

Fremdlando: . . . . . 3 »

PELAYO, 35<sup>ª</sup>- BARCELONO

**Neniu malbona esperantisto legas la**

**“FRANCA ESPERANTISTO,, 'n,**

KIUN ONI ABONAS EN

**46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS**

**JEN**

akceptas

**Postmarkojn**

de ĉiu nacio por la pago de l'abono



# UEN

## RAKONTO

pri sinjoro, kiu intencis  
malfermi ostrojn per  
konvinko

Unufojon, sinjoro, kiu estis partiano de la forto de praveco kaj malamiko de la praveco de forto, volis prui al siaj konatoj, ke ne nur la homo estas sentema al la argumento, sed ankaŭ estas tiaj la plej malsuperaj estaĵoj de la besta regno.

Liaj amikoj kontraŭstaris tian diron certigante, ke ne nur la bestoj, sed ankaŭ la plimulto de la homoj, pli bone komprenas baton per vipo ol kareson per mano. Kaj unu dirante ke jes, kaj la aliaj dirante ke ne, ili finis vetante vespermanĝon pagotan de la amikoj de la sinjoro aŭ de la sinjoro men, laŭ tio, ke tiu ĉi pruvos aŭ ne, ke eĉ la bestoj estas sentemaj al la forto de la argumentoj.

Ili iris en restoracion, kaj la sinjoro petis de kelnero, ke li alportu dekduon da ne malfermitaj ostroj, kaj li diris al siaj amikoj, ke ili vidos, kiamaniere li malfermos la alportotajn konkulojn sen ia malfermilo, nur per la povo de siaj argumentoj kaj per la konvinko, kiun parole li trudos al ili.

La kelnero alportis la ostrojn, ne sen miro, —ĉar kutime ĉiu, kiu venas en restoracion petas ilin malfermitajn, t. e. pretajn por manĝi—; kaj, metinte ilin en

unu vico antaŭ si, apoginte la manojn sur la tablo, kil ninte la bruston antaŭen kaj puriginte sian gorgon per tuseto, la sinjoro komencis sin turnante al la moluskoj.

—Karaj gekonkuloj! Honoro estas por mi, turni al vi mian parolon, kaj mi nur bedaŭras en tiu grava oka-



—Ŝajnas, ke ĝi plirapidas nun.  
—Kompreneble, ĉar estas deklivo.





—Tre interesa ĉi tiu artikolo pri la ĉapeloj dum la XXIII<sup>a</sup> jarcento!

zo, ne posedi la fluan parolon de Demosteno, la elokventencon de Mirabeau kaj la flamecon de Jaurès, por esti pli agrabla kaj ĉarma kaj konvinka al viaj oreloj.

La ostroj tute ne moviĝis, kvazaŭ ili ne estus aluditaj, kaj la sinjoro daŭrigis:

—«Mi ne venis al vi, aŭ pli bone, —se vi preferas—, mi ne venigis vin al mi por peti, ke vi deputu min en la Parlamenton. Mi ankaŭ venigis vin, nek por diri al viaj konkaj moŝtoj ke en la ostra vivado la ostriroj devas havi samajn rajtojn kiel la ostroj,—ĉar mi devas sincere konfesi, ke mi neniam atentis pri tio ĉi: ĉu Naturo partiigis vin en du seksoj, aŭ, ĉu ĉiu el vi havas la honoron esti al si mem kunedzo,—nek por inciti vin al protesto kontraŭ la polipo kaj aliaj maraj bestoj, kiuj potencas vin sub la akvo. Tiuj ĉi teruraj malegalaĵoj estas nur sableroj apud la grandega afero al kiu mi volas altiri vian gravan atenton. Mi venigis vin por paroli al vi pri la vivo kaj la morto...!»



—Ĉu estas vi, kiu fabrikas tasojn kun la prenilo je la maldekstra flanko, por la personoj al kiu mankas la dekstran brakon?

La ostroj eble ne komprenis la gravecon de tiuj ĉi vortoj, eble ne aŭskultis ilin, ĉar ili nenian movon faris; kaj la sinjoro daŭrigis:

—«Jes, por paroli al vi pri la vivo kaj la morto, kaj pri tio, kio igas la viron granda kaj la morton mirinda por ĉiu ajn... Mi scias, mi bone scias, ke viaj kleraj racioj tuj komprenis, ke mi aludas la konsciencon. Jes, la konscienco estas por lo vivo kaj por la morto la plej grava grandiganto, kies posedon ni ĉiuj deyas celi. Ho, jes, mi vidas per via silento,—ĉar, kiu silentas jesus—, ke mi estis prava, kiam mi diris, ke vi tuj komprenis, ke mi parolas al vi pri la konscienco. Ne alion oni povis esperi de via klereco kaj inteligenteco.»

La ostroj, kvankam tiel flatitaj, faris nenian movon eĉ por danki; la amikoj de la sinjoro kaŝis la vizaĝojn per la manoj por ne montri sian ridon, kaj la oratoro daŭrigis senlace:

—«Kio restas al la vivo se ni forprenas de ĝi la konsciencon? Kaj, kio fariĝas la morto se ni mortas sen ia difnita celo, tute nesciante pro kio kaj por kio ni forlasas la vivon? Estas necese scii por kio ni vivas



kaj estas necese scii por kio ni devas morti. Same, kiel ni ne devas permesi, ke oni trudu al ni difinitan vivmanieron se tia maniero ne estas en nia naturo, tiel ni ne devas permesi ke oni trudu al ni difinitan morton, precipe, kiam sciinte, por kio ni estis kreitaj kaj por kio estas difinita nia morto, ni povas mem oferi nin, kaj gajni per tiu ofero la dankon de la tuta kreitaĵo... Bone! Nul Vi, ĉarmaj kaj ĝentilaj geostroj, estis kreitaj de Dio por ke la homo povu manĝi vin kaj gustumi vian viandon delikatan kaj apetitindan...»

La ostroj, eĉ antaŭ tia malagrabra rememoro, nenian movon faris; nek tremo trakuris iliajn konkojn. Eble ili ne aŭskultis la sinjoron; eble ne aŭdis lin. Li tamen daŭrigis:

—«Vi scias tion; do, kial vi nun kontraŭstaras la celon de via vivo, la celon de via morto, kaj la deziron mian, —kiu estas manĝi vin—, kaj kial vi restos antaŭ mi fermitaj, devigante min, preni malfermilon kaj trudi al vi la malfermon de viaj konkoj?»

Ĉar vi devas esti malfermataj kaj manĝataj, tial ke tia estas la destino donita al vi de Dio, kaj tial ke estante mi la plej forta, se vi memvole ne malfermiĝas mi malfermos vin perforte, ĉu ne estus pli inda je vi agi memvole kaj malhelpi per tio la alvenon en la mondon de trudo, kiu ĉiam estas malbela kaj neŝatinsa?»

La ostroj obstinaj ne moviĝis; la amikoj ridis; la sinjoro daŭrigis:

—«Konsideru la ekzemplon de la floroj, kiu malfermas siajn burĝonojn ne atendante ke la homo faru tion perforte, ĉar ili scias, ke ili venis en la mondon por malfermiĝi kaj doni kolorojn kaj parfumojn al la sen-



—Tio estas hontiga por mi, Rikardo. Bankroti, nun! Ĉiu pensos, ke mi edziniĝis kun vi pro amo!

toj kaj ornami la butontruon de la dandoj. Konsideru la ekzemplon de la ŝuoj, kiuj eluziĝas pli rapide ol la homo mem volas, tial ke ili scias, ke ili estis konstruitaj por eluziĝi kaj gajnigi la vivon al la flikistoj. Konsideru la ekzemplon de la gazoj, kiuj flugas supren sen ia ordono, ĉar ili scias, ke restante malsupre ili malhelpus la spiradon de la astmuloj... Ĉiu aĵo agas konsciencie; kial, vi, do, restos atendante ke forto estu uzata kontraŭ vi? . Malfermu viajn konkojn, vi gravaj kaj seriozaj ostroj; malfermu viajn konkojn proponante al mi, kion mi prenos, se vi ne proponas, kaj montrante al la homaro, ke vi estas tiel konsciencplenaj kiel la cetero de la kreitaĵoj...!»




Lata



—Malŝiŝa vi! Hieraŭ vi forgesis la fenestrojn de la banejo malfermitaj, kaj tiuj junuloj elrigardadis vin...  
 —Mi scias. Sed mi sciis antaŭ, ke ili ne povas imagi, ke mi vidis ilin.





—Mi tion ne komprenas! Jam aperis la printempaj ĉapeloj, kaj ankoraŭ la vetero estas malbonegal



La amikoj ridegis tiel laŭte, ke per la bruo altiris ĉirkaŭ la tablon, kie estis la ostroj, preskaŭ ĉiujn ĉe estantojn en la restoracio. Konatoj kaj nekonatoj, aŭdante la parolon de sinjoro tiel serioze sin turnante al moluskoj, miris kaj tordiĝis pro ridego. Sed subite la ridegoj haltis kaj la miro fariĝis pli granda.

Unu el la ostroj —oni ne scias ĉu ĝi estis ostrino—, tre malrapide, tre zorge kaj serioze —kompreneble— malfermis siajn konkojn iom post iom.

Ĉiu homo restis antaŭ la fakto preskaŭ senspira; rigardante surprizita tian neespereblan okazaĵojn.

Kaj la ostro, iom post iom, malfermadis tre zorge kaj mal rapide siajn konkojn.

Ĉiu miregis, kaj en la ĝenerala miro oni nur aŭdis la voĉon de la sinjoro, kiu kun la vizaĝo plena de ĝojo, daŭrigis sian paroladon petante de la ceteron de la moluskoj la malfermon de la konkoj kaj laŭdante tiun, kiu la unua komencis memvole agi laŭ la praveco de lia diro.

Kaj la ostro, iom post iom, malfermadis siajn konkojn en la ĝenerala granda miro. Miro, kiu fariĝis grandega, kiam la ostro, kiu jam estis tute malferminta siajn konkojn, sin turnante al la sinjoro ankoraŭ paroladanta, ekkriis:

—He, nu, sinjoro, fermu la buŝon, mi petas!

MORALO. La ridego tiam fariĝis tiel granda kiel la miro; oni mokis la sinjoron, kiu estis devigata pagi la vespermanĝon tial, ke li, kvankam li atingis malfermon, atingis ne per la forto de konvinko sed per la forto de la tedo. Kaj per tio ĉi estas montrita, ke kiam oni multe parolas eĉ kun praveco oni fariĝas teda; kaj, ke, kiam oni havas rilatojn kun estaĵoj, kiuj havas konkojn, oni pli multe atingas de ili per la tedo ol per la konvinko mem.



—Senkontraŭdire, mia






la kolego, la epoko apartenas al la libereco. Nu! Ĉu aeroplano ekzemple, ne estas muelilo liberigita?





—Imagu, ke mi estas sintakso, kaj mia amikino—ortografio. Kiun vi elektus el ni ambaŭ?  
—Mi tre ŝatas sintakson sen manko de ortografio.





## DILETANTOJ

—Ĉu la horloĝo jam sonoris la dekan?  
 —Jes; ĝi jam sonoris; ĝi ankaŭ sonoras bone!







*Adam.*

—Kaj, kie vi loĝas, vi?  
—Mi? Mi transloĝiĝis!

## NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro . . . 3 Fr. (1,200 sm.)  
Jarduono . . . 2 » (0,800 sm.)

# JEN

Eldonisto: RAMON FARRÉ str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la ĈEKBANKO  
ESPERANTISTA • Merton Abbey. LONDON SW.)

### REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Ver'ag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghhandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Kiosko 77<sup>a</sup>, 10. Boulevard Capucines. PARIS



# FREMDA HUMORO

SOISUJO



FELIX VALLOTTON



Felix Vallotton, auto-portreto




LE MALIN'S PAT



LE VIOLONCELLE



# DAURIGO





# HACHETTE KAJ K<sub>10</sub>

79, Boulevard Saint - Germain

=====  
=====  
Paris

APERIS

## Vortaro de Esperanto

de Kabe. . . . . 4 frankoj.

KAJ

## Enciklopedia Vortareto Esperanta

de Verax . . . . . 6 frankoj.

NE AĈETU ILIN, SE VI ILIN JAM AĈETIS.





—Gertrudo diris, ke la nigra vesto ne sidas al mi bone.

—Lasu diril! Ŝi envias vian vidvinecon!